KURSOJ kaj renkontoj - COURS et rencontres

Université Populaire du Canton de Genève, 23 rue du Vuache,
1201, Genève (derrière le collège Voltaire)
Tél: 022 339 05 00 - Fax : 022 339 05 09
E-mail : info@upcge.ch - Site Internet : www.upcge.ch
Jara kotizo : CHF 50.00 Kursoj : po SFr. 50.00 por unu kurso (semestre)
Loko: Ecole de Commerce de Genève, Nicolas-Bouvier, rue de Saint-Jean 60,
CH-1203 Genève, Tel.: 022 546 22 00.
Nivelo I, marde de 18h00 ĝis 19h30
Nivelo II (gramatiko/konversacio), merkrede de 18h00 ĝis 19h30

Ĝeneva grupo : Esperanto-Grupo La Stelo, Case postale 734, CH-1212 Grand Lancy 1. Kontakto : S-ino Christiane Sixtus retpoŝte: ch.sixtus@bluewin.ch . La grupo kunvenas ĉiun unuan mardon de la monato en la Maison des Associations, 15 rue des Savoises, Salle Jacquard, je la 20-a horo (konfirminde).

JEGG - Junulara Esperanto Grupo de Ĝenevo
Renkontoj okazas unu aŭ du foje monate (merkredon aŭ jaŭdon) ĉe Green Café, 77 boulevard Carl Vogt, Plainpalais, Genève, je la 19-a horo. Por ricevi informojn, bonvolu aliĝi ĉe : http://groups.google.com/group/jegg aŭ sendi mesaĝon al : junularagrupo@gmail.com

Laŭzana grupo : Laŭzana Esperanto Societo, Case postale 246 - CH-1000 Lausanne 22. Tel. 021-729 58 02 Interete : www.alawa.ch/les
Renkontoj ĉiun unuan lundon de la monato je la 20-horo en la Bufedo de la Stacidomo.

CDELI - La Chaux-de-Fonds
Sabataj stud-aranĝoj
Didaktikaj stud-sabatoj : la trian sabaton de la monato
por ĉiuj esperanto-lernantoj.
Kulturaj seminarioj : la unuan sabaton de la monato
celas klerigon koncerne al la historio kaj literaturo de esperanto
de la 10-a matene ĝis la 17-a posttagmeze
Aliĝo : Nancy Fontannaz, telefone 021 728 31 27 au rete :
nancy.fontannaz@gmail.com
Partopren-kotizo : CHF 15 (stud-sabato), SF 20 (seminario)
Adreso: CDELI, Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds.Tel: 032 967 68 42, retadreso : gacond@bluewin.ch

ANNECY, France
Annecy Esperanto
Responsable: Rolande HUDRY - 5 av. de Barral
74960 SEYNOD - Tél. 04 50 51 06 29
Les cours ont lieu le mercredi à partir de 16 h. - Salle Jumel - Quai des Clarisses (à côté de la Croix-Rouge).

°°° Ne forĵetu tiun broŝuron, bonvolu doni ĝin al iu alia °°°

Asocio
Espéranto - Genève - Régions
www.esperanto-geneve-regions.info

LIMSALTANTA FOLIO

somero-aŭtuno : No. 5, 2011

La asocio Esperanto-Genève-Régions estas translima asocio kiu celas krei ligojn inter grupoj de Esperantistoj en Pays de Gex, Lago Lemano, Rodanalpo kaj Ĝenevo, inter aliaj.

La Asocio organizas babilan rondon, La Lunda Grupo, ĉiun lundon ekde la 18-a horo ĉe la "Brasserie aux Cheminots", 7 rue des Gares, malantaŭ la stacidomo Cornavin en Ĝenevo (apud la Poŝtoficejo Montbrillant).

En ĉi-tiu numero : Asocia agado, poezio,
ŝercoj, nomoj de floroj, kaj aliaj interesaĵoj ...

Por pli da informoj, vizitu nian retpaĝaron :
www.esperanto-geneve-regions.info
Il y a des pages en français! - There are pages in English!
aŭ kontaktu nin
retpoŝte : esperantoegr@gmail.com
telefone : Charmian +33 (0)450 422 802 retpoŝte : charmian@aliceadsl.fr
aŭ Marie +33 (0)450 421 956
kaj en Ĝenevo : Laure 0768614836
Poŝtadreso : 36 parc du Bugnon, 01630 St Genis-Pouilly, Francio
Kontoj (Svisa Poŝtobanko CCP): 17-207679-3

Tiuj kiuj deziras, povas kontribui simbolan sumon al Asocio EGR de € 3.00 aŭ SFr 5.00 (jare) - donacoj ankaŭ bonvenas! Por membriĝi, nur demandu kaj vi ricevos membro-karton.

Por informoj pri la **Svisa Esperanto-Societo** : www.svisa-esperanto-societo.ch
Kunprezidantoj: Mireille Grosjean, Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets
Tel: 032 932 18 88 retpoŝte : mirejo.mireille@gmail.com
Dietrich Weidmann, Archstr. 2, 8610 Uster, Tel: 044 251 50 25
info@esperanto.ch

Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris
www.esperanto-france.org info@esperanto-france.org

Ni kore dankas niajn membrojn kaj geamikojn por ilia subteno.
Nous remercions chaleureusement nos membres et amis pour leur soutien.
We warmly thank our members and friends for their support.

°°° Ne jetez pas cette brochure, s.v.p. donnez-la à quelqu'un d'autre °°°

Ne intence — Optimismo

de Raymond Schwartz

el La Stranga Butiko

Ne intence ....

Akcidente, — ne intence, —
Mi sur vian ŝuon paŝis;
Bedaŭrinde en la ŝuo
Ĉarma piedkalkan' sin kaŝis.

Tuj instinkte, — ne intence, —
Vi frakasis mian ĉapon;
Bedaŭrinde sub la ĉapo
Mi ja ankaŭ havis kapon.

Konsekvence, — ne intence, —
Vi tre elegante lamis,
Mia kapo doloregis
Kaj mi vin duoble amis.

Kaj lamante, — ne intence, —
Vi faletis, - mi vin tenis,
Tiam ... tiam ... ĉu intence ?
Vi en miaj brakoj svenis ...

Optimismo

Ĉar pluvetis dum la tago
Kaj defalis florpetal',
Aŭ ĉar dronis muŝ' en lago
Kaj ektimis najtingal':
Tra senkora universo
Larme vibras via verso.

Se mi devus kun poetoj
Pale plori sen esper'
Pri la etaj mizeretoj
Ĉiutagaj sur la ter':
Nu, mi estus krokodilo
Ie ajn ĉe l' granda Nilo.

Sed mi estas hominfano,
Kvankam stranga specimen',
Tial mi kun bona sano
Vivas kvazaŭ en Eden':
Kontraŭ pluvo – sub ombrelo,
Kontraŭ zorgoj – ĉe barelo!

Ingenieroj estas alia speco !

Du inĝenieroj – ni nomu ilin Johano kaj Roĝero – decidis iun tagon, ke ili rekontiĝu apud la rivero por promeni. Johano alvenis la unua kun nova mirinda biciklo.

Roĝero : Saluton Johano ! Ho, jen tre ŝika biciklo, kiun vi havas. Mi eĉ ne sciis ke vi intencis aĉeti.

Johano : Ne, ĝi estas stranga afero, ĉar mi ne aĉetis ĝin. Survoje ĉi-tien min trafis belega juna fraŭlino. Ŝi haltis, demetis sian biciklon, senvestigis sin ĝishaŭte kaj diris « Prenu, kion vi volas ».

Roĝero : Kaj..... ?

Johano : Do mi prenis la biciklon.

Roĝero, post mallonga hezito : Vi pravis. Ne multe taŭgus al vi ŝiaj vestoj.

Richard Wilson, per Interreto

Adiaŭo

Iutage, Honoro, Akvo kaj Vento estis adiaŭontaj reciproke post longdaŭra vojaĝo tra la mondo.

– Kie ni povos renkontiĝi denove? demandis Akvo kaj Honoro al Vento.

– Jen mi loĝadas sur montpintoj, respondis Vento, jen mi ludas sur la ebenaĵoj, jen mi petolas sur la stratoj, jen mi funkciigas la muelilojn, jen mi plenblovas la velojn de la fiŝkaptistoj, jen mi movetadas la marondaron, jen mi kisetas la florpetalojn, jen mi alkuras refreŝigi la fraŭlinon, kiu min invitas per sia parfumita ventumilo ...

– Kaj kie ni povos revidi vin? sin turnis Honoro kaj Vento al Akvo.

– Mi trafluas la florkovritajn herbejojn, respondis Akvo, banas la plantaĵojn, surrosigas la ĝardenojn, sensoifigas ĉie la brutaron kaj la homojn, respegulas sur la serenaj lagoj tage la sunon, nokte la stelojn kaj la lunon, kaj kelkfoje kaskadas rulbruege en majesta fortelmontro ...

Tiam, Akvo kaj Vento demandis Honoron :

– Kie ni devos serĉi vin kaj havi plezuron vin havi kun ni?

– Rilate al mi, parolis Honoro, bedaŭrinde, geamikoj, kiu forperdis min, neniam plu min denove renkontos!

NdlR : "fortelmontro" signifas "montro de forteco"

Nica literatura revuo, n-ro 4/4

Verda angulo

Volontuloj ĉirkaŭ la globo "Purigas la mondon"

Oni taksas ke, de la 16-a ĝis la 18-a de septembro, 35 milionoj da volontuloj de Londono al Antigvo-Barbudo, de Islando ĝis Tongo, partoprenas la 18-an Jaran Semajnfinon "Ni purigu la Mondon".

La puriga semajnfino okazas en partnereco kun la Programo pri NaturMedio de Unuiĝintaj Nacioj (UNEP) kaj ĉi tiu jaro la temo estas "Nia Loko ... Nia Planedo ... Nia Respondeco."

Unu el la plej grandaj de tiaj eventoj, la semajnfino "Ni Purigu la Mondon" celas inspiri komunumojn, komercojn kaj registarojn partopreni agadojn kiuj pritraktas lokajn naturmediajn aferojn.

La amplekso de agadoj kaj landoj kiuj partoprenas estas grandega – ekzemple projekto de reciklado en Antigvo-Barbudo, la unua en la lando; plantado de arboj fare de lernejoj en Tehrano; kaj pluraj komunumaj purigadoj en Londono.

Alia evento kadre de naturmedia kaj urba konscio estas La Monda Tago de la Park(ad)o, la 16-an de septembro. Partoprenantoj "luas" parklokon kaj provisore transformas ĝin en io alia, kion aliaj homoj povas ĝui, ĉu parko, ĉu urba ĝardeno, eĉ kliniko.

Ni purigu la Mondon (Clean up the World) – http://www.cleanuptheworld.org
Park(ad)a Tago (Park(ing) Day) – http://parkingday.org

Fonto: The Independent, 19-a de septembro 2011

16/02/2011

RENKONTO DE LA KUIRART-GRUPO DE EGR
LA 30-A DE JANUARO 2011 EN DOUVAINE

De kelkaj jaroj oni kutimas renkontiĝi ĉe Jean-Loup tiuperiode. Origine oni trapasis tutan dimanĉon laborante dum la mateno kaj distriĝante postagmeze. La krespoj konsistigis la ĉefan parton de la tagmanĝo, tiel ke ni nomumis tiun tagon « Krespa dimanĉo ».

Ĉi-jare, neniu krespo, neniu kanada formulo, sed alloga menuo preparita de kuirteamo konsistanta el Marie, Ghyslaine kaj Jacqueline. Jean-Loup zorgis pri la loĝistiko kaj Thuy, kiel dommastrino, estis de granda helpo.

Jen la menuo : bunta telero (krudaĵoj kun pecetigita kokidaĵo); bovidblanketo kun rizo; fromaĝo; fruktosalato; diversaj kukoj.

Ekde la 10.30-a horo, arde laboris la kuiristinoj. Oni planis kuiri uzante la esperantan terminologion pri kuirarto. Bone tio funkciis je la komenco sed, ju pli alproksimiĝis la rendevuhoro, des pli ni emis labori franclingve.

Tamen, kiam alvenis la gastoj ĉio estis (preskaŭ) preta.

El St-Genis, Ĝenevo, kaj la Duvena regiono venis la kutimaj ĉeestantoj : Didier, Richard, Laurence, Roberto, David kun siaj filinoj, Charly. El Amphion kaj Evian venis novuloj Guy, Suzanne kaj Nicole. Ili ĝojis renkontiĝi kun aliaj esperantistoj ĉar ili ne tro ofte havis la okazon antaŭe (almenaŭ fizike).

Post la aperitivo ni estis 16 ĉirkaŭ la tablo. La pladoj venis unu post la alia kaj regalis la kunmanĝantojn. Ankaŭ bonan vinon oni trinkis. Oni tintigis la glasojn kaj lumigis kandelon por festi la naskiĝtagon de Didier.

Dum la manĝo la etoso estis varma kaj brua. La bonaj parolantoj atente paroligis la komencantojn tiel ke ĉi-tiuj estis kuraĝigataj kaj ne sentis sin ekskluditaj.

Tre interesa momento estis la prezentado fare de Guy de la retpaĝaro kiun li mem estigis kaj regas : http://apogilo.webou.net . Tiu retejo estas vera ilo por apogi la lernadon kaj komprenadon de la esperanta lingvo kaj ankaŭ de la franca.

Ĉar la partoprenantoj venas el diversaj horizontoj kaj havas diversajn spertojn, la interŝanĝoj estis riĉaj. Tial la tempo rapide pasis sed lasas ĉe ĉiuj el ni feliĉajn memorojn.

Jean-Loup Gaudin, Grupestro

Pik-niko en sovaĝa ĝardeno !

La 6-an de aŭgusto 2011 okazis en la ĝardeno de Charmian ĝoja pikniko - feliĉe nur pluvis dum ni trinkis kafon, do ni ŝirmiĝis en la kelo - poste, la pluvo ĉesis kaj ni povis viziti la ĝardenon, inter alie, la novan ombraĝ-ĝardenon kaj la malnovan naturan basenon, kiu montris kelkajn belajn nufarojn kaj ruĝajn fiŝojn. Ni estis 9 ĉeestantoj kaj kompreneble ni multe babilis - nur esperante - kaj gustumis bonajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kiujn ĉiuj kunportis. Unu ĉeestanto estis ege feliĉa: la siama kato, Fajfu, kiu estis ege dorlotita, ĉefe de Ghyslaine kiu vere putris lin !

Charmian

Plurlingva listo de konataj eŭropaj floroj

esperanto	*franca*	*angla*	*germana*	*latina*
neĝborulo	le perce-neige	snowdrop	das Schnee-glöckchen	Galanthus nivalis
primolo	la primevère	primrose	die Primel	Primula vulgaris
krokuso	le crocus	crocus	der Krokus	Crocus albiflorus
jonkvilo	la jonquille	daffodil	die Narzisse	Narcissus pseudo-narcissus
narciso	le narcisse	narcissus	die Narzisse	Narcissus poeticus
miozoto	le myosotis	forget-me-not	das Vergissmein nicht	Myosotis sylvatica
violo, heĝa	la violette	violet	das Veilchen	Viola odorata
trikoloreto	la pensée	pansy	das Stiefmütterchen	Viola tricolor
ranunkulo, orbrilo, buterbrilo	le bouton d'or	buttercup	die Butterblume	Ranunculus
papavo	le coquelicot	poppy	der Mohn	Papaver
lekanto	la marguerite	daisy	das Gänse-blümchen	Bellis perennis
trifolio	le trèfle	clover	der Klee	Trifolium sp
lonicero, kaprifolio	le chèvre-feuille	honeysuckle	das Geissblatt	Lonicera sp.
geranio	le géranium	geranium	die Geranie	Geranium
pelargonio	le pélargonium	pelargonium	das Pelargonium	Pelargonium
cardo	le chardon	thistle	die Distel	Carduus sp.
antirino	la gueule de loup	snapdragon	das Löwenmaul	Antirrhinum majus
krizantemo	la chrysanthème	chrisanthemum	die Chrisantheme	Chrisanthemum sp
tropeolo	la capucine	nasturtium	der Kapuziner	Tropælium majus
tageto	la rose d'inde	African marigold	die Tagetes, die Studentenblume, die Sammetblume die Ringelblume	Tagetes erecta
balzamino	l'impatience, la balsamine	Busy Lizzie	der Balsam, das fleissiges Lieschen	Impatiens Wallerana
eriko	la bruyère	heather	das Heidekraut, die Erika	Erica
rozalteo	la rose trémière	hollyhock	die Malve	Alcea malvaceae
digitalo	la digitale	foxglove,	der Fingerhut	Digitalis

Fonto : Interreto

Ŝercoj

*SEN GRASO ? KIA FATRASO !
Kruko plendas pri stomakdoloro:
*Mi pensas ke ĉi tiuj sengrasaj terpomflokoj kaŭzas misdigeston.
• Jozefino : Ĉu vere ? Fakte, mi aŭdis ke tio povas okazi ĉe iuj.
• Kruko : Mi ne komprenas tion. La unua sako tute ne misefikis....
Fonto: Richard Cash - Anekdotoj en Esperanto

*TRUMPETO
*-- Kial vi ŝtelis la trumpeton de la najbaro ? Vi tute ne havas muzikan talenton !
-- Eblas, sed ankaŭ la najbaro ne !
Esperantigis Imre Szabo.

KIO ESTAS EN ĜI ?
Kruko kaj Baniko ludas per piedpilko. La pilko preskaŭ trafas la kapon de Baniko, sed li evitas ĝin.
Baniko: Mi ĉiam timas kapfrapon per pilko.
Kruko: Sed Banĉjo, vi neniel timu tion. Vi povas sentime resaltigi la pilkon per via kapo -- ĝi tute ne povas dolorigi vin.
Baniko: Ĉu certe?
Kruko: Jes ja! Estas nenio en ĝi krom aero !
Baniko: Ha, ĉu ?
Kruko: Jes. Kaj cetere, estas same nur aero en la pilko !
Fonto: Richard Cash - Anekdotoj en Esperanto

Dankon al Paula Vité

*FILOZOFIA PLENECO
*Kruko vidas, ke Baniko sidas gapanta al sia glaso.
Kruko : Kio 'kazas, knab' ? Ĉu vi demandas al vi, ĉu via glaso estas duonplena aŭ duonmalplena ?
Baniko: En antaŭaj jaroj, mi ja demandis al mi tion : Ĉu mia glaso estas duone plena aŭ duone malplena ?
Kruko : Kaj ?
Baniko : Sed nun, de kelka tempo, mi demandas min, ĉu mia glaso estas preskaŭ malplena aŭ jam komplete malplena !
*NB : "Kio 'kazas, knab' ?" = kurtigo de konversado por : "Kio okazas, knabo?"

Fonto: Richard Cash - Anekdotoj en Esperanto

*KUN PARAŜUTO
*Paneas ĉiuj motoroj, la aviadilo ekfalegas. Inter la teruriĝintaj pasaĝeroj aperas la saltipreta piloto kun paraŝuto sur la dorso :
- "Bonvolu ne maltrankviliĝi, mi iras por helpo !"
Esperantigis Imre Szabó

FANTOMKASTELO
En skota fantomkastelo alvenas turistoj.
-- Ĉu estas prave, ke en la kastelo loĝas ankaŭ fantomoj ? interesiĝas unu el ili ĉe la salongardisto.
-- Ba ! Mi vidis fantomon neniam, kvankam mi laboras ĉi tie jam 750 jarojn.

Esperantigis Imre Szabo.

"Ĉu vi jam aŭdis pri Atlantiko?"
"Jes. Mi eĉ transnaĝis ĝin. Kaj ĉu vi aŭdis pri la Morta Maro?"
"Ho jes. Ja ĝin mortigis mi."
Fonto : Lernu !

Ni estas grupo de novaj esperantistoj, do okazas ke ni eraras Ni estos dankemaj se vi bonvolus atentigi nin prie!

El via vidpunkto ...

ĈU NI BEZONAS MAŜINTRADUKOJN POR VIKIPEDIO ?

Dum la 96-a Universala Kongreso de UEA en Kopenhago, estis prelegoj pri la temo « kiel disvastigi Esperanton elektronike ? ». La Esperanta Vikipedio (interreta libera enciklopedio kun 150 000 artikoloj en aŭgusto 2011) estas unu el tiaj rimedoj, dank'al pli ol unu miliono da vizitantoj ĉiumonate. Por pligrandigi la nombron da artikoloj, aŭtomataj tradukoj per komputilo (« maŝintradukado ») estis proponataj. La pli komunaj maŝintradukadoj al la Esperanta estas Wikilingue kaj WikiTrans. En aŭgusto 2010, la unua posedis 360 000 artikolojn tradukitajn el la Hispana, kaj la dua (rapide evolua projekto de la danaj firmaoj GrammaSoft Aps kaj Syddansk Universitet) posedis 1,5 milionon da artikoloj tradukitaj el la Angla. Eblas ke ili foje estu konsideratoj kiel helpiloj, tamen tiaj artikoloj ne estas, ne devas esti rekte kopiitaj al la Esperanta Vikipedio, pro sekvantaj kialoj.

1) Eĉ la pli faka kaj la pli evolua maŝintradukado (WikiTrans) fuŝadas, ne nur en tekstoj mem, sed ankaŭ pri titoloj, tio aperas (ofte ne evidente) kiam oni estas sufiĉe atentema; neniu maŝino povas, kaj povos anstataŭi homojn, kiuj komprenas detale la aferojn.
2) Se ekzistus perfekta automata tradukado por traduki iu ajn lingvon al iu ajn alia (WikiTrans jam tradukas rekte la Anglan al la Dana lingvo), tio signifus ke ne plu estas bezona la Esperanta internacia ponto-lingvo; tia maŝintradukado kontribuus mortigi Esperanton.
3) Ĉiu lingvo estas ligita al sia pensmaniero, al sia kulturo; maŝintradukado algluita al alia lingvo perdigas al Esperanto ĉi tian propran spiriton, kaj do estas nefruktodona por nia celo.
4) Esperantaj artikoloj devas alporti kion oni ne trovas en aliaj lingvoj, por ke scivolaj, novaj Esperantistoj aŭ ne-Esperantistoj interesiĝu al la internacia lingvo; sed longaj, tedaj, multeprecizaj, fakegaj anglaj artikoloj maŝintradukataj al lingvo, kiu estas nenies gepatra lingvo, certe mallogos tiujn legantojn, Prefereble estas redaktado en Vikipedio de mallongaj, koncizaj artikoloj, kiuj povas indiki klarigojn, kiuj ne ekzistas en iu ajn alilingva Vikipedio; kaj aldono de agrablaj prezentoj, bildoj kaj koheraj referencoj ja allogos tiamaniere eĉ nefakulojn pri priskribitaj teĥnikaj aferoj.

Konklude por Vikipedio, se redaktanto uzas maŝintradukadon, necesas, ĉiam necesos, ke tiu ĉi redaktanto, kiu tute komprenas la konsideratan temon, relegu, korektu kaj iamaniere personigu (sed ĉiam laŭ "neŭtrala vidpunkto") la maŝintradukitan artikolon.

Didier Cornuet

Homo en prizono, kiu scias, ke ĉiuj leteroj iras tra cenzuro, ricevas leteron de la edzino: "Kara, kiam mi plantu la terpomojn?"
La prizonulo skribe respondas jene: "Ne forgesu la ĝardenon por la terpomoj, ĉar tie estas la enterigitaj armiloj!"
Post kelkaj tagoj lia edzino respondas: "Ses detektivoj venis al nia domo kaj senmanke trafosis la ĝardenon, sed nenion trovis!"
La prizonulo skribis responde: "Nun vi povas planti la terpomojn!"

Fonto : Lernu!